

tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



*Kaj en la
Olimpikoj
de Grand-
Papagio
oni skias
supren!*

**Estraraj
Bondeziroj
2006**

**Nova Afrika
Komisiono**

**Pasporto al la
Tuta Mondo**



Saluton!

Kiel vi ĉiuj
versajne jam
scias, TEJO
estas regata de
la Komitato, la
supera deci-
dorgano de
TEJO. Tiu ĉi

jaro estas elektojaro – t.e. jaro en kiu oni elektas novan Komitaton. En la sekvaj paĝoj vi ekscios kiel ankaŭ vi povas fariĝi aktiva partoprenanto en la regado de TEJO. Vi povas tion fari kiel reprezentanto de Landa Sekcio (do, kiel komitatano A) aŭ kiel demokratie elektita reprezentanto de la individuaj TEJO-membroj (do, kiel komitatano B). Memoru ke TEJO estas via asocio – kaj do vi povas kundecidi la direktoron de TEJO per partopreno en la demokratia procezo!

Poste ni turnos nian atenton al agado tra la mondo – sed en ĉi tiu numero vi havos okazon gustumi ekster-eŭropajn agadojn. Ni komencos en Afriko, kie nun nova Afrika Komisiono de UEA aktivas. Poste ni vizitos Pakistanon kaj Argentinon. Ni eĉ vizitos mian hejmlandon, Usono, kie naskiĝis kaj kreskis la plej aŭdaca Esperanto-instruprojekto iam ajn entreprenita – Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo!

Fine, ni volas memorigi al vi ke la enhavo de TT dependas plene de viaj kontribuoj. Por ke TT estu ĉiam pli bona, ni tre bezonas **vijajn** kontribuojn – ja TT estas **via** revuo, same kiel TEJO estas **via** organizo. Raportu pri viaj

novaĵoj, spertoj en organizado de aranĝoj, kursoj ktp., reklamu viajn aranĝojn! Ni tre antaŭdankas vin pro ĉiuj viaj kontribuoj!

Jen grava novaĵo por TT-legantoj! Ekde nun vi povas legi TT-on **antaŭ ol ĝi venos al vi en la presita formo**, pere de la reta Jarlibro de UEA (www.uea.org). Bonan legadon!

Joel

P.S. Ne forgesu rekotizi en TEJO/UEA por 2006!

<Enhavo>

Estraraj Bondeziroj por 2006	3-4
Realigu Vian Projekton per Freŝa Vento!	4
Atentu, Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO! 5	
Sud-Afrika Kongreso en Muizenberg, Kaburbo, Atendas Vin!	5
Kandidatiĝu Por Komitataneco B de TEJO 6	
Nova Afrika Komisiono Elektita	7
Monda Socia Forumo en Afriko	8
Esperanto Forte Videblis en la 2-a Pakistanana Socia Forumo	9
Pasporto al la Tuta Mondo!.	10-13
Esperanto Dum la Eduka Ekspozicio en Argentino	13
“Oni trovos en ĉi tiu libro ĉion kio faras Esperanto-parolanton vera esperantisto”	14-15
Kalendaro	16

Limdato* por 2006:3 – 1-a de majo, 2006!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel WORD-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: **TEJO Tutmonde, 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono.** Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Redaktoro: **Joel AMIS** (Usono). Vic-redaktorino kaj kompostistino: **Jenja AMIS** (Ukrainio/Usono). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

* Se vi volas kontribui al TT, sed la limdato jam pasis, sendu ĝin ĉiuokaze – ĝi simple publikiĝos en la sekva numero.

Estraraj Bondeziroj por 2006

Estas januaro, kaj en Oslo, kie mi loĝas, estas vintro. Kaj tio ja ĉe mi signifas ke ekstere estas neĝo, temperaturoj duciferaj sub la nulo, kaj apenaŭ suna lumo dum la tago... ĉu ne? Nu, tradicie tio estis vero. Sed nun ja ŝanĝiĝas la mondo kaj ankaŭ ĝia klimato – ne plu estas la vintroj tiel malvarmegaj kiel antaŭe, nek plu estas tiom da neĝo. Kaj mi promesas: pluvo falanta sur la frostiĝintan teron fariĝas la plej glita glacio, kiun vi iam ajn imagus! Piediri al la laborejo estas por mi jam danĝera sporto. Feliĉe, helpas meti sablon miksitajn kun salo sur la vojon – almenaŭ ĝis kiam denove pluvos. Sed kvankam neĝo ne estas, kaj la plej malvarma tago estis nur minus ok gradoj C, la suno ne ŝanĝis sian ritmon nek pozicion, do ni havas nur malmultajn horojn da lumo tage. Hodiaŭ mi, kiel ĉiamdormanta porketo, ne krablis el mia lito antaŭ la 14-a horo, nur por trovi ke la suno jam vizitis kaj forpasis. Novan ŝancon mi havos morgaŭ...

Novan ŝancon mi havas ankaŭ dum tiu ĉi jaro 2006 por influi la evoluon de TEJO. Kune kun la nova Estraro mi uzis la lastan duonjaron post nia elektigo por bone plani nian agadon dum la restanta oficperiodo. Ni eniras nun periodon kun kelkaj malfacilaj cirkonstancoj, sed kun multegaj ŝancoj. La plej grava malfacilaĵo estas nia financa situacio, pleje kiam temas pri ekstereŭropaj monfontoj. Por havi bonan agadon en la tuta mondo estas grave ke ni trovu ankaŭ monfontojn kiuj subtenas agadon en ĉiu mondoparto kaj regiono kie ni havas membrojn. Tio estas tasko grandega, kiu postulas multe da tempo kaj multajn homfortojn. Sed ni sukcesos, mi certas! Mi esperas ke la tutmondiĝo de TEJO-agado okazas rapide sed kontrolate, tiel ke jam dum mia oficperiodo mi povu sperti bonegajn aranĝojn en tiuj mondopartoj kie TEJO tradicie ne estis tro aktiva.

Dume mi promesas nome de la Estraro ke ni ĉiam laboras kaj laboros por la bonega baza

funkciado de nia organizo, por ke ni estu fortaj kaj povu elteni malfacilajn periodojn sen perdi la esperon. Ni laboros ankaŭ por la bonega trejnado de aktivuloj de TEJO tiel ke ni havu novan generacion de spertaj, lertaj aktivuloj kiuj povas montri al la mondo ke Esperanto kaj TEJO estas la plej bona hobbio kiun eblas havi!



Elkore salutas,
Heming WELDE THORBJØRNSEN
Prezidanto de TEJO

Estas 525 membroj en 2005 kompare al 436 en 2004. Kaj 56% el la tuta membraro estas novaj junaj membroj kiuj ne kotizis en la antaŭa jaro 2004. Tamen estas pripensinda la fakto ke la membraro de TEJO perdis 37% de pasintjaraj membroj.

Kie kuŝas la kialo por aliĝi al TEJO? Ĉu la ĉefa kialo estas sento aparteni al la internacia Movado al kiu aldoniĝas la eblo ricevi servojn de TEJO, partopreni seminariojn, ricevi ĝiajn eldonaĵojn, esti ĉiam informita pri kio okazas en la junulara Esperanto-mondo, ĝui rabaton dum la Internacia Junularo Kongreso? Ĉio menciita tute ne konsistigas maltaŭgan kialon: internaciemo estas la baza sento en Esperantujo, simple pro tio ke Esperanto havas sencion en la internacia medio.

En 2005 al TEJO aldoniĝis 44-a Landa Sekcio, kiu, same kiel ĉiuj aliaj, ekhavis avantaĝojn por sia funkciado – la asocio estos en la internacia informfluo, havos voĉon en la Komitato de TEJO, kaj tio signifas esti ĉiam informita per sia reprezentanto pri kio okazas en la kerno de la organizo, kiujn projektojn povas partopreni LS kaj ĝiaj membroj, kie kun-



labori; la asocio povos inviti IJK-n al sia lando.

Por la jaroj 2006/2007 la Estraro nomas tutmondan agadon la ĉefa el la prioritatoj de TEJO-laboro. Per tio ni celas disvastigi kaj plifortigi aktivulan trejnadon, eksterajn rilatojn kaj landan agadon en kiel eble plej multaj regionoj de la mondo. Certe, en tiu tasko al TEJO nepre helpu Landaj Sekcioj kaj grupoj de junaj aktivuloj surloke. Agado tutmonda povos ne nur helpi ekhavi pli da membroj en la organizo sed ankaŭ estas efika rimedo por propagandi kaj disvastigi la lingvon. Varbado estas la kampo sur kiu ni povus kunlabori internacie kaj helpi unu la alian per siaj spertoj kaj kapabloj. Kaj temas ne nur pri kunlaboro inter TEJO kaj unuopa Landa Sekcio. Tre gravas por organizo ĝenerale ke ĝiaj LS-oj kunlaboru inter si mem. Por tio en la pasinta jaro estis starigita la fondaĵo Freŝa Vento pri kiu vi povis legi en TT 2005:6. TEJO ne nur per sia sperto, sed ekde nun ankaŭ per la financaj rimedoj strebas subteni la realigadon de projektoj fare de LS-oj

kune. Tia kunlaboro fortigas la kontaktojn inter la asocioj, donas la eblon uzi Esperanton internacie kaj povas fariĝi alloga celo por la aliaj Esperanto-grupoj en la mondo.

Tre gravas ĉiam, ne nur por la nova jaro, teni niajn membrojn, trejni niajn aktivulojn, alvoki al la organizo junajn membrojn (mi celas ĉi tie la aĝon sub 18 jaroj). Iom da investo de nia energio, ekz., eta grupo da homoj kiuj atentis pri la integriĝo de novuloj dum renkontiĝoj kaj kelkaj taŭgaj programeroj. Novula programo dum renkontiĝoj, kiel, ekz., IJK kaj IS nuntempe, uzindas ankaŭ en la ĉiutaga laboro de iu ajn Esperanto-asocio.

Mi kredas ke la nombro de individuaj membroj de TEJO kreskos en 2006, sed eĉ pli mi volas ke niaj membroj strebu kunlabori inter si kaj realigi projektojn. TEJO siaflanke kaj nome de ĉiuj 44 LS-oj ĉiam pretas subteni la agadon.

En la Nova Jaro de la ruĝa hundo, laŭ la ĉina kalendaro, mi deziras al ĉiuj fortojn kaj sukceson en via vivo kaj laboro!

Valentina SIDOROVA
Ĝenerala Sekretario de TEJO

Realigu Vian Projekton per Freŝa Vento!

Ĉu vi trovis la manieron por atingi la Finan Venkon sed ne havas la financojn por efektivigi ĝin?! Eble, pli simple, vi delonge pripensadas projekton por disvastigi kaj plifortigi Esperanton, sed mankas al vi la mono por vidi vian “kreitaĵon” finfine realigita...

Bona novaĵo! Somere 2004 TEJO starigis novan fondaĵon, nome Freŝa Vento, ĝuste kun la celo finance subteni tiujn projektojn kiuj diversmaniere rilatas kaj apogas ĝian agadon. Taŭgaj proponoj povas esti, ekzemple, la produktado de informa materialo pri Esperanto kaj lingvaj rajtoj, organizado de iu renkontiĝo, kon-

ferenco, aktivul-trejnada seminario k.s.

Do, ĉesu sopiri kaj vizitu la paĝon www.tejo.org/freshavento, studu atente la kriteriojn kiujn la projekto devas plenumi, kaj plenigu la rilatan dosieron... Simple, ĉu ne?!

La limdato por kandidatiĝi estas la **30-a de majo 2006...** Ekpripensu en kiu kesto vi kaŝis vian projekton!

Pludemandu kaj plendu al:
Daniela TAGLIAFICO
Komisiito pri Freŝa Vento
daniela.tagliafico@esperanto.it

Atentu, Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO!

Venis la jaro 2006, para jaro en kiu, laŭ la Artikolo 3-2 de la TEJO-regularo, devas esti nomumitaj novaj Komitatanoj A de TEJO.

Komitatanoj A en la TEJO-Komitato estas la reprezentantoj de Landaj (Fakaj) Sekcioj de nia organizo. La Komitato estas la supera organo de TEJO. Inter ĝiaj taskoj estas elekti la Estraron kaj decidi pri ĝia agado, aprobi la buĝeton, decidi pri akcepto de novaj Landaj kaj Fakaj Sekcioj k.a.

Ĉiu Landa Sekcio rajtas je nombro de reprezentantoj responde al la nombro de kalkulablaj membroj:

- 15-100 membroj – 1 komitatano A
- 101-300 membroj – 2 komitatanoj A
- 301-1000 membroj – 3 komitatanoj A

Ĉiu Faka Sekcio kiu havas almenaŭ 15 kalkulablajn membrojn rajtas je 1 reprezentanto.

Kondiĉoj:

- la Landa (Faka) Sekcio estu junulara asocio de gepatra Landa (Faka) Sekcio de UEA, aŭ ĝi pagu kotizon por siaj Junaj Aligitaj Membroj
- la Komitatano A estu individua membro de TEJO (li/ŝi estu maksimume 29-jaraĝa kaj estu membro en unu el la jenaj kategorioj: MJ(T), MA(T) aŭ DM(T))
- Interesiĝu pri la funkciado kaj la estonteco de TEJO

– Prefere havu retaliron almenaŭ unufoje en 2 semajnoj

– Kontribuu laŭeble al la TEJO-Cirkuleroj

– Laŭeble partoprenu la Komitatkunsidojn dum IJK.

Kiel fariĝi Komitatano A?

La Prezidanto de via Landa (Faka) Sekcio sendu al la Ĝenerala Sekretario de TEJO vian nomon kaj etan formularon enhavantan vian retan kaj poŝtan adresojn, telefonnumeron, naskiĝdaton.

Kiam kaj kiel nomumi Komitatanojn A?

Ĝis la 30-a de aprilo, 2006, skribe al la Ĝenerala Sekretario.

La oficperiodo de la nomumitoj estos ekde la 1-a de junio 2006 ĝis la 31-a de majo 2008

Por pliaj informoj vizitu <http://www.tejo.org/aktivuloj/regularo/regularo.php?parto=enkonduko> kaj/aŭ skribu al la Ĝenerala Sekretario valentina@tejo.org aŭ al la TEJO-volontulo officejo@tejo.org

Vidu ankaŭ la Oftajn Demandojn ĉe la TEJO-vikio: www.tejo.org/vikio/Oftaj_Demandoj

Valentina SIDOROVA

Ĝenerala Sekretario de TEJO

Sud-Afrika Kongreso en Muizenberg, Kaburbo, Atendas Vin!

Baldaŭ en Sud-Afriko okazos la nacia kongreso. Dum la kongreso, la TEJO-estrarano en Afriko, Francois HOUNSOUNOU, gvidos la TEJO-programeron de tiu ĉi plej granda kaj plej grava E-aranĝo en Afriko. La programo estas interesa. Enestas allogaj ekskursoj kaj TEJO-aktivajtoj.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn partopreni la Sud-Afrikan kongreson en Sud-Afriko, la 27-an de aprilo ĝis la 1-a de majo. Bonvenegas ne nur la afrikanoj, sed ankaŭ eksterafrikanoj – por internaciigi la

kongreson.

Vi povas rekte aliĝi al la kongreso per la jena TT-paĝo: <http://www.esperanto.za.org/eo/index.html>

Por pliaj informoj, bv. turni vin al:

Magali Von BLOTTNITZ

49 Balfour Road

Woodstock 7925

South Afrika / Sud-Afriko

Tel:+27(0)21 448 6775

Fakso:+27(0)86 620 6052

ret-adreso: magali@xsinet.co.za

Kandidatiĝu Por Komitataneco B de TEJO

Venis la tempo por kandidatiĝi kiel Komitataro B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2006 ĝis la 31-a de majo 2008.

La Komitato estas la supera instanco de TEJO, kies taskoj estas difini ties ĝeneralan agadon, elekti Estraranojn kaj decidi pri ilia agado, aprobi la buĝeton kaj decidi pri reglamentoj. Ĝi konsistas el Komitatoj A, Komitatoj B, Komitatoj C kaj la Estraranoj de TEJO. La Estraranoj estas elektitaj en ĉiu malpara jaro, kio okazis antaŭnelonge dum la Internacia Junulara Kongreso 2005 en Zakopane. La cetero de la Komitato estas elektata en ĉiu para jaro. Ĝia nova oficperiodo estos de junio 2006 ĝis majo 2008. Komitatojn A nomumas Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO ĝis la 30-a de aprilo de ĉiu para jaro. Komitatoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo. Kaj fine, la Komitatojn C elektos la jam elektitaj Komitatoj A kaj B.

Ĉiu individua membro de TEJO rajtas elekti sian reprezentanton en la TEJO-Komitato. Kaj same – ĉiu individua membro de TEJO rajtas kandidatiĝi kiel Komitataro B kaj tiel rekte kundecidi en la Komitato pri gravaj okazaĵoj en la Organizo. Ĉi-foje oni rajtas elekti maksimume ses Komitatojn B.

Por eniri la Komitaton estas bonvenaj aktivuloj de Landaj Sekcioj aŭ lokaj grupoj, kiuj per sia laboro pretas kontribui al la funkciado kaj evoluo de la Organizo.

Por ke via kandidatiĝo estu valida, bonvolu

sendi al la Centra Oficejo aŭ al la Ĝenerala Sekretario de TEJO la jenajn informojn:

- personajn datumojn (nomon, naskiĝdaton, retan kaj poŝtan adresojn, telefonnumeron)
- biografieton kaj priskribon de viaj Movadaj celoj. Grandeco de la teksto devas ne superi 100 vortojn.
- subtenleterojn aŭ subtenajn subskribojn de minimume kvin individuaj membroj de TEJO el minimume du landoj.

Ne forgesu subskribi vian kandidatiĝon, se ĝi estas paperpoŝta! Sen iu el la menciitaj eroj kandidatiĝo ne estos valida!

Via kandidatiĝletero devas alveni plej laste la **15-an de majo 2006**.

Uzu la jenajn adresojn:

paperpoŝte: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

retpoŝte: oficejo@tejo.org; valentina@tejo.org

Detalajn informojn rilate la kandidatiĝon kaj elekton de la Komitatoj B vi povas trovi en la “Regularo pri TEJO” kaj en la “Reglamento pri elekto de Komitatoj B”. Ilin vi povas trovi en la reto ĉe <http://www.tejo.org/aktivuloj/regularo/regularo.php>. Paperan version mendu ĉe la TEJO-volontulo en la CO laŭ la supre menciita adreso. Se vi havas iujn demandojn, ne hezitu kontakti la TEJO-volontulon aŭ la Ĝeneralan Sekretarion.

Valentina SIDOROVA
Ĝenerala Sekretario de TEJO



Nova Afrika Komisiono Elektita

La multjara aktivulo Jean CODJO el Benino kiu nun loĝas en Kanado, gvidas la novan Komisionon de UEA pri Afrika Agado. La aliaj membroj de la Afrika Komisiono, kiel ĝi kutime estas nomata en la ĉiutaga uzo, kaj iliaj specialaj laborkampoj estas Antoine Kouablan KOUASSI (Eburbordo; eksteraj rilatoj), Emile MALANDA (DR Kongo; rilatoj kun afrikaj asocioj kaj grupoj), Francois HOUNSOU-NOU (Benino; Afrika Oficejo, TEJO, ILEI), Jeremie SABIYUMVA (Burundio; informado al ne-esperantistoj) kaj Moliere NGANGU (DR Kongo; turismo en Afriko).

La antaŭa Komisiono havis 12 anojn, sed por efika komisiona laboro tia kvanto montriĝis malpraktika, pro kio la Estraro revenigis la grandecon de la komisiono al tiu de la aliaj regionaj komisionoj de UEA. La Komisiono starigos pli grandan konsilan organon, Afrikan Konsilantaron, kiu konsistos el reprezentantoj de unuopaj afrikaj landaj asocioj kaj movadoj. Jean CODJO jam dissendis alvokon pri kandidatoj por la Konsilantaro.

Fine de decembro 2005 ĉesis validi la kontrakto de UEA kun Instituto Zamenhof pri funkciigo de la Afrika Oficejo en Lomeo, Togolando, ĉar tiu ĉi ne konsentis pri precizigoj en la kontrakto, kiuj celis pli bone konformigi ĝin al la Statuto de UEA. Nova sidejo de la Afrika Oficejo estas nun starigata en la apuda lando Benino, kaj UEA baldaŭ informos pri ĝia nova stabo.

Adresoj de la Afrika Oficejo de UEA

La nova Afrika Oficejo de UEA estas starigata en la urbo Lokossa en Benino. Ĝis la baldaŭa dungo de oficistoj, pri diversaj taskoj okupiĝas volontuloj. La poŝta adreso de la oficejo estas:

Afrika Oficejo de UEA,
BP 416

Lokossa-Mono
Respubliko Benino /
République du Bénin

La Esperantaj periodaĵoj kaj organizaĵoj estas petataj aktualigi siajn adresarojn laŭ la supra informo. La Afrika Oficejo volonte akceptas gazetojn

kaj lernomaterialojn ĉe sia nova adreso. La sola retadreso de la oficejo estas: afrika.oficejo@uea.org.

Fondaĵo Afriko bonvenigas donacojn por subteni la Esperanto-agadon en Afriko. Precipe pli grandajn sumojn eblas donaci ankaŭ al Kapitalo Afriko, kiu uzas sian jaran renton por la Afrika Agado de UEA.

Ĉiam pli da afrikanoj sopiras pri membreco en Universala Esperanto-Asocio kaj tial turnas sin al Fondaĵo Canuto. Por povi respondi al tiu kreskanta bezono, Fondaĵo Canuto alvokas por donacoj de solidaraj esperantistoj. Donacojn al la fondaĵoj de UEA oni povas sendi pere de kotizperantoj de UEA aŭ rekte al la Centra Oficejo per poŝtaj aŭ bankaj kontoj de UEA, kreditkarte, ĉeke aŭ per PayPal (vd. Jarlibro 2005, p.37-38).

el Gazkomoj de UEA

Monda Socia Forumo en Afriko

Prelegoj, intervjuoj ĉe lokaj radio-stacio kaj gazetoj, disdono de flugfolioj pri Esperanto, ekspozicio de kelkaj Esperantaj verkoj – tiel resumiĝas la aktivaĵoj de kvin geesperantistoj el kvar afrikaj landoj (Benino, Ebura Bordo, Malio kaj Togolando) okaze de la Monda Socia Forumo en Bamako de la 19-a ĝis la 23-a de januaro, 2006.

La sukcesa partopreno de la afrika delegacio de UEA en tiu ĉi tutmonda renkontiĝo en Malio en kiu partoprenis pli ol 30 mil homoj el la kvin kontinentoj, ŝuldiĝas al la klopodoj de UEA-komitato s-ro Antonio José VERGARA el Ĉilio. Li tre fervore perkoresponde partoprenis en la prepara fazo, konsilante kaj donante instrukciojn al ni.

Kvankam la vojaĝo en buso al Bamako estis ege laciga pro la malbona stato de vojoj, ni tie dum la tuta periodo de la Forumo ne ripozis. Ni havis budon pri Esperanto en la kortego de la kultura palaco. Tie ni deĵoris por buŝe havigi informojn, respondi al demandoj de vizitantoj, disdonante al ili reklamilojn pri la Internacia Lingvo. Ni krome registris adresojn de ĉiuj kiuj montris intereson pri la lingva studo, kaj entute estis listitaj ĉirkaŭ 150 adresoj.

Dum diskutrondo aranĝita de la asocio “Libereco por la Lingvoj”, kies temo estis “Afriko kaj la mondo estas plurlingvaj – kiom da lingvoj afrikanoj devas do paroli”, ni intervenis kaj vigle kaj elokvente pledis por Esperanto al centoj da homoj el diversaj mondanguloj.

Adjévi emfazis la lingvan diskriminacion en la internacia komunikado, reliefigis la neŭtralecon de Esperanto kaj ties rolon protekti la naciajn lingvojn, el kiuj kelkaj minoritataj estas mortantaj pro la lingvaj imperiismoj de “grandaj” landoj. Konklude li prezentis Esperanton kiel idealan lingvan egalrajtigon. Ĉion ĉi poste tradukis franclingve François kaj



Idrissa en la bambaran, nacia lingvo en Malio. Antoine respondis al demandoj de la scivolema publiko kaj fine, la franca esperantisto Francisko SIMONNET, gvidanto de la diskuto, fermis tiun ĉi favore al Esperanto.

Francisko revojaĝis dimanĉon al sia patrolando, sed lia kontribuo surloke al sukcesa prezento de Esperanto dum la forumo menciindas tie ĉi. Li disponigis al ni pakajon da Esperantaj libroj kaj flugfolioj. Li poste pledis pri Esperanto per la gazeto de la Forumo, en du lokaj gazetoj *L'Essoir* kaj *Nouvel Horizon*, kaj lia intervjuo ankaŭ estis elsendita per la ondoj de la radio *Kledou*.

Tiom ni ŝatis marki la eventon per Esperanto kiom la tempo permesis al ni. Aliaj tiaj renkontiĝoj post unu jaro okazos samperiole en du malsamaj afrikaj landoj, Sud-Afriko kaj Kenjo. Kaj hodiaŭ pli ol antaŭe ni devas esti pli solidaraj kaj engaĝiĝintaj por defendi kune la verdan aferon, ĉefe dum manifestacioj kiuj havas similajn celojn kiel tiuj de UEA.

*Raportis Adjé Adjévi (Togolando)
el Gazkomoj de UEA*

Esperanto Forte Videblis en la 2-a Pakistana Socia Forumo

La 24-an de januaro okazis la 2-a Pakistana Socia Forumo (PSF) en Ali-Instituto de la urbo Lahore. Estis invititaj ĉiuj pakistanaj organizaĵoj kaj asocioj kiuj laboras por la rajtoj de infanoj, virinoj, laboristoj, lernantoj kaj suferantoj de diversaj problemoj. Originale Monda Socia Forumo (MSF) devintus okazi en Karaĉi, sed ĝi estis prokrastita pro la tertremo. Pro tio oni aranĝis la 2-an PSF por montri unuecon kun MSF-2006 en Karakaso kaj Bamako. MSF-2006 en Karaĉi okazos de la 23-a ĝis la 27-a de marto 2006.

Anoj de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) kaj estraranoj de Esperanto-Internacia Akademio (EIA) partoprenis, kunlaboris kaj aranĝis budon kun multaj libroj kaj enkondukaj materialoj pri Esperanto. Miloj da personoj partoprenis en la 2-a PSF kaj multaj vizitis la budon de PakEsA kaj multe demandis pri Esperanto. S-ro Rahim SHAH KHAN (ĉef-vicprezidanto de PakEsA), s-ro Javaid EASAN (ĝenerala sekretario de PakEsA kaj komitatano de UEA), s-ro Muhammad AFZAL (financa sekretario de PakEsA) kaj s-ro Malik Abdul MUNIR (direktoro de EIA kaj anstataŭanta prezidanto de Lahorea Esperanto-Klubo), s-ro Mian Muhammad Naveed AKRAM, s-ro Hamid Saleem MINHAS, s-ro SHAH, s-rino ANNI kaj s-rino UMMERAH k.a. respondis la demandojn kaj disdonis senpage enkondukajn materialojn al ĉiuj.

Ankaŭ estraranoj de PSF kaj MSF 2006

vizitis la budon de PakEsA. Multaj el ili jam antaŭe konis Esperanton. Muhammad Nawaz ARAIN, kiu estas estrarano de la Junulara Grupo de Monda Socia Forumo 2006 kaj ankaŭ prezidanto de Karaĉia Esperanto-Klubo (KEK) en sia parolado traktis ankaŭ Esperanton kaj la pakistanan kaj tutmondan Esperanto-movadojn. Li diris ke Pakistana Socia Forumo, Monda Socia Forumo kaj Esperanto agas por samaj celoj, kiel ekzemple lingvaj rajtoj, demokratio kaj paco. Fine li invitis ĉiujn viziti la budon de PakEsA.

Televidaj reprezentantoj faris intervjuojn pri Esperanto. Grupo de PakEsA vizitis ankaŭ budojn de aliaj asocioj kaj organizaĵoj kaj renkontis iliajn reprezentantojn. Antaŭ la fino de la Forumo ĉiuj partoprenis en solidara marŝado de proksimume tri kilometroj.

Unuafoje en Pakistano Esperanto estis montrita antaŭ multaj reprezentantoj de diversaj organizaĵoj. Pakistana Esperanto-Asocio faris multajn amikajn rilatojn kun ili.

Shabbir Ahmad SIAL, prezidanto de PakEsA, taksas ke pro la Pakistana Socia Forumo la Esperanta Movado de la lando fortiĝos pli kaj pli. “Fakte Pakistana Esperanto-Asocio ludis tre bonan kaj fortan rolon en la agadoj de la 2-a Pakistana Socia Forumo”, li fiere konkludas. Pro granda helpo en la preparoj por sukcesa partopreno li esprimas dankon al la prezidanto de UEA Renato CORSETTI kaj al la komitatoj de UEA José Antonio VERGARA el Ĉilio kaj A Giridhar RAO el Barato.

el GazKomoj de UEA

Pasporto al la Tuta Mondo!

En junio 2005, dum la landa kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kaj poste en julio dum la UK, estis inaŭgurita la plej aŭdaca, granda, longdaŭra kaj multekosta E-projekto: la DVD-versio de la videokurso *Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo*. Ni petis al Lusi HARMON, la direktoro de la projekto, rakonti pli pri “Pasporto” por la legantoj de *TT*!

– *Unue – gratulojn al vi kaj ĉiuj kiuj partoprenis pro la kreado kaj inaŭguro de la kurso! Rakontu pli pri ĝi! En kies kapo naskiĝis la ideo fari tiel grandegan kaj aŭdacan projekton?*

– Mi provis trovi iun daton por rimarki kiam la ideo venis en mian kapon, sed mi ne povis trovi la komencon. *Eble* tio okazis kiam, dum mallonga periodo, ekzistis leĝo en Kalifornio ke en niaj elementaj lernejoj oni instruu fremdajn lingvojn. Tiu eksperimento, kompreneble, tute fiaskis pro la manko de instruistoj. *Eble* tio okazis kiam loka filmkreado kontaktis nin por fari videokurson pri Esperanto. Ni verkis la tekston por *The World of Esperanto with Steve ALLEN* – “La mondo de Esperanto kun Steve [stiv] ALLEN” (siatempo fama humoristo en Usono) en 1972 kaj montris ĝin dum la UK en Portlando, Usono. *Eble* tio okazis kiam Audrey Childs MEE en 1989 venis por instrui somere dum nia kutima trisemajna kurso en San-Franciska Ŝtata Universitato. Ŝi estis fama pro la uzado de la “rekta” metodo, kaj estis la eblo filmi ŝin. Bedaŭrinde, ŝi subite mortis, kaj ni devis trovi alian formon de la “rekta” metodo. Post longa studo kaj multaj provoj, ni decidis filmi daŭran rakonton pri la “aventuroj” de la familio Bonvolo. Por kolekti monon, ni faris reklam-videon kiu estis filmita, redaktita kaj montrita en 1996 en la Praga UK. Tiun version verkis Edwin GROBE.



Steve WAGENSELLER kaj Jianping Zhao el Radio Pekino kontrolante la ĉinajn subtitolojn

– *Kia estas la ideo malantaŭ la kurso? Estas ja tre nekutima familio – greka filozofa, meksika dancistino, juĝisto, artisto, kuristo... Kial estas ĝuste tiel?*

– Kiel respondi al tio? Do, la “familio” kaj vizitantoj spegulas la diversecon de esperantistoj. Ni fakte strebis kiel eble plej multe eviti iun tipan familion, ĉar ni celis pli vastan montradon de Esperantio. Ni ankaŭ alfrontis la fakton ke ni devas produkti kaj filmi la scenojn dum almenaŭ kvin jaroj. Ni rimarkis ke, ekz., en la kazo de *French in Action* [frenĉ en ekŝn], franclingva kurso por anglalingvanoj, la kostumoj jam eksmodiĝis. Do ni elektis rolulojn... kaj vestis ilin per kostumoj kiuj difinas la rolojn: greka “togo”, baleta dancjupeto, juĝista robo kaj peruko, artista kitelo, atleta vesto de kuristo.... La ĉefaj kostumoj ja ne eksmodiĝos! Ni celis ke la roluloj estu universalaj kaj havu iun... pretertempo econ – tiel ke la lecionoj estu uzeblaj sen ŝanĝoj dum multaj jaroj.

– *Ĉu la originala ideo kaj fina rezulto estas pli-malpli samaj, aŭ ĉu ĝi transformiĝis dum la farado?*

– La originala ideo estis krei “rekt”-metodan kurson por elsendi ĝin televide – parte pro vera manko de instruistoj. Ja ekzistis diversaj

fremdlingvaj televidaj kursoj: *French in Action* aŭ *Mazi in Gondoland* por instrui la anglan al infanoj – mi pristudis ilin por akiri pli da ideoj. Ni daŭre sekvis la bazan ideon, sed ni trovis ke ĉiu paŝo sugestis ideojn por pligrandigi ĝin. En la komenco ni celis nur vidbendan programon kiu povus esti elsendata televide kaj uzata en la klasĉambroj aŭ individue. Tio postulis ke ni produktu ankaŭ skribitan tekston (kun tradukoj de la vortoj de la instruisto) kaj ekzercojn. Kaj kiam ni preskaŭ finis tion, evidentiĝis ke DVD-formato estus multe pli facile uzebla. Kiam ni konvertis la vidbendojn en DVD-ojn, ni komprenis ke estus relative facile aldoni subtitojn rekte sur la ekranon. Ni nun aldonas subtitojn de la vortoj de la instruisto en kiel eble plej multe da lingvoj. Tiu procezo daŭre stagnas... Ni nun havas subtitojn en kvin lingvoj kaj almenaŭ pliaj tri “survojas”. Ni fine celas havi almenaŭ 12 ĉefajn lingvojn – eble poste al tio aldoniĝos pliaj ok, kiu scias? La kosto de la kurso en DVD-formato estas malpli granda, kaj por produktado kaj por dissendado, ol la kosto de ĝi en la vidbenda formato.

– *Kiu verkis la scenaron por la kurso?*

– Kiam profesoro GROBE devis rezigni post la kreado de la reklamvideo, ni estis tre feliĉaj trovi d-ron Paul GUBBINS kiu jam verkis lernolibron uzante tre ĉarman rakonton. Estis grandega plezuro labori kun tiu tre talenta aŭtoro! La ekzercojn verkis Stefan MacGILL, la enkodukon al la metodo por la studentoj verkis d-ro Duncan CHARTERS, kaj la DVD-igo estis farita de Diana BABECK WEICHERT (ŝi ankaŭ aldonas la subtitojn). Subtitojn en la angla plejparte faris mi kaj mia edzo, en la hispana – Enrique ELLEMBERG kaj Leonora GONZALES, en la franca – Normand LEGAUX. Tiu laboro estas tre malfacila, kaj ni daŭre invitas partoprenantojn!

– *El kio fakte konsistas la kurso?*

– La DVD-versio de la kurso konsistas el kvar DVD-oj, sur ĉiu disko estas po kvar duon-

horaj lecionoj – entute proksimume ok horoj. Ankaŭ estas du KD-oj; unu entenas la tutan tekston de la dramo kaj la klarigojn de la gramatiko en la vortoj de la instruisto. La dua KD entenas ekzercojn por eĉ pli bone klarigi la enhavon de la dramo kaj gramatikon – proksimume 350 paĝoj. La plasta skatolo havas belan kovrilon kun fotoj el la dramo, kaj ĉiu disko havas tre buntan ektikedon. Ĝi aspektas kiel profesie farita kurso – kia ĝi ja estas.

– *Kiu estas la celgrupo de la kurso kaj kiuj estas la aĉetantoj de la diskoj – ĉu individuoj aŭ tamen E-instruistoj, por siaj gelernantoj?*

– La celgrupo de la komenco estis gejunuloj. Tamen, ni trovis ke ankaŭ infanoj kaj eĉ maljunuloj amas ĝin – krom se ili ne povas iom ridi pri kelkaj stultaj agoj kiujn ni esperantistoj faras. Ĝis nun aĉetintoj estis eble duone individuoj kaj duone instruistoj – ofte instruistoj aĉetas kromajn ekzemplerojn por la studentoj kiuj spektas la lecionojn hejme kaj uzas la klasperiodon por ekzercado.

– *Rakontu iomete pri la celoj kaj la uzitaj metodoj en la kurso – ĝi ja ne nur instruas la lingvon sed ankaŭ donas sufiĉan superrigardon pri E-kulturo, ĉu ne?*

– La celo, kompreneble, estas helpi nin “krei” esperantistojn pere de interesa rakonto kiu, jes, montras la avantaĝojn de nia lingvo. Ĝi baziĝas sur la plej lasta nuntempa metodo de la instru-



Marjorie Boulton (dekstre) kun Diana Babeck Weichert spektantaj *Pasporton*



Miko SLOPER (la "patro"), Lusi HARMON (direktoro) and Steve WAGENSELLER (la "detektivo")

ado de fremdaj lingvoj. La avantaĝo de tiu ĉi multflanka aliro estas ke ĝi simulas la specon de trempig-sperto kiu montriĝas plej efika por la lingvolernado. En "Pasporto" oni aŭdas Esperanton parolatan en la natura kunteksto, kun multe da vid- kaj situaciaj replikoj por faciligi la komprenadon de la signifo.

Aktualaj studoj pri lingvoakirado indikas ke instigi studenton estas plej grava. La amuzaj intrigo havas daŭran "sap-operan" stilon kiu tenos la intereson de la studentoj. La iom farsa stilo ne nur amuzas sed ankaŭ malstreĉas la spektanton kaj trankviligas la studenton pri ties propraj eraroj.

Dua elemento de la aktuala lingvoinstruada teorio insistas pri la graveco de la natura komunik-materialo. Ni uzas "real-vivajn" situaciojn en la vivo de la Familio Bonvolo. Konsentite, la familio kaj ĝiaj konatoj estas iom surrealaj, sed tre konindaj kaj ĝuindaj. La uzo de DVD-oj permesas al la instruisto aŭ studento ripete spekti scenojn kaj elementojn por pli bone kompreni ilin.

– *Kiu financis la projekton? Ĉu aktoroj ricevis ian pagon aŭ ĉu ili estas plene volontulaj?*

– Bone, ne demandu kiom kostis aŭ finfine kostos la projekto. Ne nur aktoroj ne ricevis

pagon, sed ankaŭ ĉiu alia esperantisto kiu laboris, faris tion pro amo al Esperanto. La kosto estas grandega ĉar ni uzis profesiulojn (neesperantistajn) por la filmado, trejnado, redaktado kaj ĉiu teknika flanko de la produktado (krom la DVD-igo kiun Diana WEICHERT studis kaj faris). Multaj de la partoprenantoj ne nur donis talenton kaj tempon, sed ankaŭ kontribuis monon. Se vi rigardos la nomojn fine de la lecionoj, vi vidos kiom da personoj kontribuis, plejparte anonime. Venis kontribuoj de la fondaĵo *Saliko* de UEA, la fondaĵo *Carson* el Kanado, la fondaĵo *FAME* el Germanio, kaj ankaŭ de multaj individuoj. Plejparte, tamen, la mono venis el la poŝoj de la ordinaraj esperantistoj en Usono kaj prunteprenoj de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Kiam ni finfine ne plu povis peti monon de la individuoj, *Esperantic Studies Foundation* provizis nin per la lastaj bezonataj sumoj. Ni ankoraŭ ŝuldas al ELNA. Ĝis nun la projekto ne donas profiton, sed plejparte la mendoj nun kovras la koston de la produktado.

– *Ĉu piratado estas granda problemoj?*

– Piratado povos esti problemoj. Ni iom evitas tion per la produktado de la diskoj nur en la kodoj uzeblaj en apartaj regionoj. Ni ankaŭ petis grupon kiu reklamis piratajn kopiojn ne plu fari tion. Ni klarigis kial: pirataj kopioj ne povas esti tiel bonaj – aparte se ili uzas KD-ojn anstataŭ DVD-ojn. Estas ankaŭ aliaj problemoj, kaj certe la subtitoloj ja ankoraŭ ne estas finitaj. La pirataj kopioj ankaŭ ne aspektas profesiaj. Kaj – plej grave – ni tute pretas fari kontraktojn kun taŭgaj reprezentatoj kiuj povos fari DVD-ajn kopiojn por siaj landoj – post kiam la subtitoloj de ties lingvoj estos finfaritaj. Ni ne celas fariĝi riĉaj, sed ni vere deziras konservi pli bonan kvaliton kaj repagi al ELNA, ĉar ĝi bezonas monon por daŭrigi aliajn laborojn.

– *Kiom kostas la kurso? Ĉu la diskoj haveblas nun?*

– Ni nun vendas la kurson kontraŭ 90 eŭroj

aŭ 110 usonaj dolaroj (kiel mi diris, ni pretas fari kontrakton kun taŭgaj instancoj por reprodukti diskojn en aliaj landoj, por malaltigi la koston). Ni jam disdonis la diskojn kontraŭ speciale rabatita prezo al la instruistoj kiuj ne povas pagi. Ni ankaŭ senpagajn kopiojn disdonos al tiuj kiuj kreas aŭ kontrolas kaj korektas la subtitolojn. Ni nun havas stokon de la kurso por regiona kodo 1 (Usono kaj Kanado), kaj tre baldaŭ haveblas stoko por la kodo 4 por Sud-Ameriko, Meksiko, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Ni nur atendas la finan kontroladon de la brazil-portugala. Ni esperas baldaŭ fini la ĉinan version, kaj ni atendas la subtitolojn por la japana, korea, persa, itala, germana, rusa kaj aliaj lingvoj.

Se vi volas kaj povas dediĉi multe da tempo, povas bone uzi komputilon kaj deziras ricevi la diskojn senpage, nepre kontaktu min

(lusiHarmon@aol.com). Ankaŭ se vi estas instruisto kaj ne povas pagi la tutan sumon, skribu al mi kion vi jam faras, kion vi planas fari kaj klarigi kial vi bezonas la kurson nun.

– *Kiam la projekto estos finita?*

– Mi fakte esperas ke baldaŭ – sed mi opinias ke necesos pliaj kvin jaroj por fini ĉiujn subtitolojn. Ni deziras produkti ankaŭ aŭdversion por blinduloj, sed ni trovis ke tio estas pli komplika ol ni supozis unue, kaj do ni devas atendi iom pli por trovi Esperantan volontulon kiu pretos fari la priskribon de la scenoj – nur produkti la sonon de la dramo ne sufiĉos. Ni ankaŭ vere devas havi gvidlibron por nespertaj instruistoj. Mi esperegas ke dum la venonta jaro ni trovos tiun kiu faros tion.

Intervjuis Jenja AMIS

Esperanto Dum la

Dum la tritaga Argentina Eduka Ekspozicio, kiu okazis oktobre 2005 en Bonaero, kelkaj membroj de Argent-EJO (la junulara sekcio de Argentina Esperanto-Ligo), kune kun membroj de la bonaera E-Asocio, deĵoris kun granda entuziasmo ĉe la stando F36 de la ĉefa ekspoziciejo de la argentina ĉefurbo.

Kiel kutime, la opinio de la plimulto pri la ĉies, kaj nenies nacia, lingvo estis tre pozitiva. Unu semajno antaŭ la komenco de la klasoj, la gejunuloj multe helpis plibonigi la aspekton de la sidejo kaj kursejo ĉe la strato Paraguay 2357 por ricevi niajn novajn gelernantojn.

Krome, la grupo de Bonaero laboras por daŭrigi la renovigon de la sidejo. En januaro kaj februaro 2006 oni muntos budon pri E-o en unu el la ĉefaj turismaj ejoj de la urbo, informante al la interesotoj pri ni kaj la Lingvo, proponante “fulmajn” 5-lecionajn klasojn. Ĉiujn 45 minutojn oni ludos KD-on pri Esperanto (ĝi ankoraŭ ne havas nomon, sed baldaŭ estos disponebla en



en Argentino

la reto kaj nia sidejo por la interesitoj).

La projekto de modernigo, plijuniĝo kaj malfermiĝo de la argentina E-movado daŭras. Oni laboras, interalie, por plibonigi la informkvaliton kaj aspekton de la ttt-ejo <http://www.esperanto.org.ar>, kaj ankaŭ proponi novajn servojn.

Informis: Argent-EJO. Grupo: Bonaero

“Oni trovos en ĉi tiu libro ĉion kio faras Esperanto-parolanton vera esperantisto”

Vojaĝo en Esperanto-lando. Boris KOLKER. Rotterdam: UEA, 2005. 280 p. 240x150. ISBN 929017088-3. Aĉetebla de la libroservo de UEA – www.uea.org/katalogo



Ni esperantistoj fieras pri nia literaturo – kaj ni havas ĉiujn kialojn por tio. Ni havas originalan kaj tradukitan literaturon de ĉiuj ĝenroj, ĉiajn vortarojn kaj lernolibrojn, librojn por komencantoj... Sed ĉiam restis granda manko en tiu ĉi

listo: ni ne havis librojn por progresintaj esperantistoj. Aŭ, pli precize, ni ja havis kelkajn (kiel *Paŝoj al Plena Posedo* de William AULD) – sed eĉ post legado de ili, novaj esperantistoj ofte perdiĝis en la Esperanto-komunumo, plena je subtilaĵoj, nomoj, faktoj, aludoj kaj la tuta aro da mallongigoj ne konataj al la komentantoj. Ja daŭras sufiĉe longe akiri (de E-libroj, revuoj, instruistoj) ĉiujn informojn por esti bone edukita esperantisto, kiu konas la bazajn faktojn kaj ankaŭ malpli konatajn informojn pri Esperanto kaj ĝia historio...

Tiel estis... antaŭ la publikigo de *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris KOLKER. Tiu ĉi libro estis tiel sukcesa ke ĝi fariĝis la plej vendata Esperanto-libro, kaj en 2005 UEA publikigis la trian eldonon de tiu ĉi unika libro (la unua eldono estis publikigita en 1992 en Moskvo, la duan eldonon publikigis UEA en 2002 – ĝi estis elĉerpita ene de malpli ol du jaroj).

La ŝanĝoj inter la dua kaj la tria eldonoj ne estas tre signifaj: la tuta stilo, ege ŝatata de esperantistoj, estas konservita: estas la sama kolorplena kovrilo, la samaj belaj ilustraĵoj de Francisco VEUTHEY – eĉ la kvanto de paĝoj restas la sama! Do, kio novas? Unue, la formato: ĝi fariĝis pli granda (kvankam la prezo estas la sama kiel por la antaŭa eldono), do, la tekstoj estas pli facile legeblaj. La ilustraĵoj kaj la fotoj aspektas pli bone en la pli granda versio kaj estas pli kontrastaj; iuj fotoj kaj bildoj estis aktualigitaj; estas ankaŭ kelkaj novaj ilustraĵoj. Krome, la libro fariĝis malpli dika kaj malpli peza je preskaŭ triono, pro la uzo de malpli dika papero – tamen, la kvalito neniel suferis pro tiu ĉi ŝanĝo.

Esperantujo ne restas sur unu loko – aperas novaj libroj, retpaĝoj ŝanĝas siajn adresojn, iuj famaj esperantistoj forpasas... Ĉiuj ŝanĝoj kiuj okazis en Esperantujo de 2002 ĝis 2005 estas spegulitaj en la libro – ĉiuj tekstoj kaj klarigoj estas aktualigitaj kaj korektitaj; estas tie ankaŭ mencio pri la novaj libroj (kiel *Sed homoj kun homoj* de Z. Sikosek), freŝaj faktoj, ekzemple, pri la interreto kaj la retpaĝoj pri Esperanto. Krome, estas tie kelkaj novaj tekstoj (kiel ĉarma kanto *En nia mondo – Valso por vojaĝantoj* verkita speciale por la libro, elĉerpaĵo de *Neniu ajn papilio* de Trevor STEELE, informoj pri planlingvoj, klarigoj pri neologismoj kaj neoficialaj vortoj kaj afiksoj en Esperanto). Sed la plej signifa ŝanĝo por multaj esperantistoj estas aperigo de indekso de nomoj, kio tre faciligas la uzadon de la libro.

Sed kial ĝuste tiu ĉi libro fariĝis la plej bone vendata libro en Esperantujo? La respondo, verŝajne, estas kaŝita en la nomo de la libro: “Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta Kulturo”. La libro estas *ne nur lernolibro* por tiuj kiuj finis la elementan kurs-

on kaj bezonas ne tro malfacilajn tekstojn por lega praktiko: ĝi estas eta, sed tre informplena *enciklopedio* de Esperanto – kiu certe estas pli ol simple lingvo. La legantoj trovos respondojn al multaj demandoj pri la historio kaj kulturo de Esperanto, pri la faktoj kaj mejloŝtonoj de Esperanto-historio – la vivo kaj filozofio de ZAMENHOF, pioniroj de la E-movado, E-organizaĵoj kaj la plej gravaj E-eventoj. Ili konatiĝos kun E-muzeoj, radioj, revuoj kaj paroloj de la plej eminentaj esperantistoj. Krome, oni trovos “tradukojn” de la plej gravaj mallongigoj uzataj de esperantistoj – unuvorte, oni trovos en la libro ĉion, kio faras Esperanto-parolanton vera esperantisto.

Aldone al la tekstoj pri Esperanto kaj esperantistoj, oni trovos en la libro ankaŭ fragmentojn de iuj famaj verkoj de E-literaturo (prozo kaj poezio, ekde klasikaj ĝis nuntempaj) kaj ankaŭ tekstojn pri diversaj interesaj temoj – ekz., pri la populara scienco, stilistiko kaj eĉ am-kaptiloj! Estas tie ankaŭ multaj tekstoj pri diversaj landoj, kiujn mi persone ŝatis plej multe. La plejparto de la tekstoj estas verkita originale en Esperanto, kelkaj el ili – speciale por la libro; kelkaj tekstoj estis pruntitaj de E-revuoj kaj kelkaj estis tradukitaj de ne-E-aj fontoj. Ĉiuj tekstoj progresas de simplaj ĝis sufiĉe malfacilaj. Fine de ĉiu ĉapitro estas demandoj por sinkontrolo.

Krom ĉio ĉi, la libro helpas disvolvi la personajn ecojn: oni trovos tie diversajn ekzercojn ne nur pri la lingvouzo, sed ankaŭ por rezonado kaj disvolvado de bona literatura gusto (ekz., verki eseojn pri diversaj temoj). Iuj ekzercoj estas seriozaj (ekz., klarigi aŭ skribi prepoziciojn kun paronimoj – similsonaj, sed malsam-signifaj vortoj, kunigi partojn de E-proverboj ktp.), iuj estas humuraj (ekz., krei artefaritan lingvon kaj verki amleteron en ĝi).

Laste – sed ne balaste! – estas tre elstara stilo de la libro: ĝi estas verkita en la nomo de gvidanto de E-klubo. Ĉiu leciono estas renkontiĝo

en virtuala klubo “Esperanto-lando”, kun multaj “gastoj” kaj aktivaĵoj, planoj por la estonteco, ferioj – senlima inspiro kiel organizi aktivaĵojn de via loka grupo! Iuj kritikantoj diras, ke la bildo pri E-aktivaĵoj en la libro estas tro “idealisma” – jes, eble, sed ni ĉiuj povas strebi al ideala klubo kaj adopti kelkajn “aktivaĵojn” de “Esperanto-lando”!

Mi rekomendas tiun ĉi libron al ĉiuj kiuj ankoraŭ ne havas ĝin: ekde freŝbakitaj komencantoj ĝis la plej spertaj esperantistoj, por uzi ĝin dum siaj lecionoj kaj eble eĉ lerni ion novan. La sola afero kiun mi volus vidi en la venontaj eldonoj (kaj mi certas ke ili estos!) estas indekso de terminoj kaj gloson de mallongigoj.

Ĵenja AMIS

Unue aperis en *Esperanto USA* 2005:5,6; trad. el la angla la aŭtoro

La Estraro de TEJO 2005-2007		chucksmith@gmail.com
Prezidanto: Heming WELDE THORBJØRNSEN Trondheimsveien 197A/44 N-0570 Oslo NORVEGIO prezidanto.tejo@silisium.net	Eksteraj Rilatoj: Haris SUBAŠIĆ, Zagrebačka 40 BA-88000 Mostar BOSNIO KAJ HERCEGOVINO hara@ikso.net	
Kasisto: Katja IGNATJEVA Generatorgatan 1 722 24 Västerås SVEDIO katja@tejo.org	Kongresoj kaj Aktivula Trejnad: David-Emil WICKSTRÖM c/o Nastja KOJEVNIKOVA 84-1-206 pr. Lunaĉarskogo RU-195274 Sankt-Peterburg RUSIO dew@tejo.org	
Ĝenerala Sekretario: Valentina SIDOROVA 3, rue des Nereides FR-78180 Montigny-le-Bretonneux FRANCIO grimpi@bk.ru	Centra Oficejo: TEJO Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam NEDERLANDO Tel: +31-10-436-1044 Faks: +31-10-436-1751 oficejo@tejo.org www.tejo.org TEJO-volontulo: Martin MINICH	
Landa Agado kaj Afrika Agado: François HOUN-SOUNOU B.P. 226 BJ – Lokossa, Mono BENINO frank@tejo.org		
Informado: Chuck SMITH		

aprilo – majo

13-18 aprilo: 30-a Internacia Junulara Festivalo en Torricella, Umbrio, Italio. Temo: Esperanto - ĉu lingvo de paco? Rete: ijf.admin@esperanto.it

15-18 aprilo: 61-a Kongreso de SAT-Amikaro, Yzeure-Moulins (departemento Allier, centra parto de Francio). Inf: Esperanto Moulins-Allier, 27 rue de la Fraternité, FR-03000 Moulins, Francio. Rete: esperantomoulins@free.fr

29 apr-9 majo: La lingva Esperanto-festivalo Aroma Jalto, Ukrainio. Inf: p.k. 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. tel.: +380-44-2851701. Rete: volodimir_h@yahoo.com

5-7 majo: 7-a Trilanda Renkontigo de Germana Esperanto-Junularo en Cochem ĉe rivero Mosel, okcidenta Germanio. Rete: Inge.Simon@esperanto.de

6-13 majo: 58-a IFEF-Kongreso en Ŝanhajo, Ĉinio. Komuna vojaĝo el Eŭropo. Inf: István Gulyás, Rákos u. 98. HU-1155 Budapeŝt, Hungario. Rete: kozsu13@freemail.hu. Ĉina adreso: 58-a Kongreso de IFEF. P.O.Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio. Tel.: +86-10-68326682, fakso: +86-10-683218

19-21 majo: Internacia Junulara Renkontiĝo, temo: “Naciaj Kulturoj kaj Eŭropa Identeco”, en Kostrena samtempe kaj samloke kun konkurso Pokalo Kostrena. Organizantoj: Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo Rijeka. Rete: esperanto@zg.htnet.hr kaj esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

junio-julio-aŭgusto

2-5 junio: 100-jara Jubileo de Germana Esperanto-Asocio, 83-a Germana Esperanto-Kongreso Braunschweig/Brunsviko. Inf: ICH - Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg, Germanio. Tel. +49-(0)5521-5983, Esperanto-Zentrum@web.de. Aliĝilojn bv. peti de la GEA-komisito pri aranĝoj: Christian Darbellay, Kaiserstr. 39 DE-24143 Kiel, Tel. +49-(0)431-737788, Esperanto-Kiel@web.de

18-25 junio: “Velura Sezono”, 12-a Internacia Arta Esperanto-Festivalo pri esperanto-kantoj en Jalto,

Ukrainio. Inf: Jefim Zajdman, UA-98612, Jalta-12, p.k. 74 (Esperanto), Ukrainio. Tel: +380-654-231651. Rete: tero@yalta.us

3-21 julio: 37-a Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Altlernejo de Internacia Trejnado (School for International Training) en Brattleboro, Vermonto. Rete: EDDYELLEN@aol.com

21-23 julio: 54-a Kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, Fashion Institute of Technology, Novjorko, Novjorkio. Rete: www.esperanto-usa.org.

20-27 julio: Internacia Familia Renkontiĝo kun la temo “Kuirarto” en Kievo, Ukrainio. Vi estas atendata en la ĉefurbo de Ukrainio. Ankaŭ vi montru bongustaĵojn de via popolo al aliaj esperantistoj! Poŝte: ab. ja. 91, UA-04201 Kiev, Ukrainio. Tel: +380-44-4320743 (h). Rete: ml@espero.kiev.ua

25-29 julio: 39-a ILEI konferenco kun la ĉeftemo: “Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj” en Parma, Italio. Inf: Aida Čiĝikaitė Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Tel: +370-37-208503, +370-616-15991 (m). Rete: aidute@mail.lt

29 jul-5 aŭg: 91-a Universala Kongreso de Esperanto, UK 2006 en Florenco. Inf: Itala Esperanto-Federacio, rete: fei@esperanto.it

29 jul-5 aŭg: 37-a Internacia Infana Kongreseto, IIK 2006 en Prato, Italio. Inf: Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio, tel: +33-299836986, rete: bert.schumann@free.fr, aŭ Leonardo Pampaloni, via Cironi 15, 59100 Prato tel: + 39-0574 604100, rete: pampal@freemail.it

6-13 aŭgusto: 62-a Internacia Junulara Kongreso (IJK 2006) en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. Rete: hara@ikso.net

13-20 aŭgusto: Internacia Junulara Semajno en Makó, Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. Rete: ijs@ijs.hu. Senpaga/duonpaga partopreno por 2 personoj pere de Premio Melinda

20-27 aŭgusto: FESTO 2006 en la kastelo Grezjono, Francio. Rete: cyrille@esperanto-jeunes.org

Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>